


LA
VERDA
STELO



**ESPERANTO
NEDERLAND**

**SEKCIO GRONINGEN-DRENTE
&
FRISA ESPERANTISTA RONDO**

Novembro 2009



LA VERDA STELO

eldono de

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

ESPERANTO-KLUBO GRONINGEN-DRENTE

prezidanto

s-ro J.B. Swenker
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
tel. +3150 527 45 72
retadreso:
johan.swenker@xs4all.nl

sekretario

s-ino N.R. Kiel-Klunder
G. Sterringastraat 60
9728 VV Groningen
tel. +31505251436
retadreso: nrkielklunder@hotmail.com

kasisto

s-ro L. Staghouver
Julianalaan 25
9781 ED Bedum
tel. +3150 301 40 15
retadreso: luitstaghouver@home.nl

FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman
Westerein 14 a
8571 GB Harich (Frl)
tel. +3151 460 22 72
retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1
ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas
de la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

redakcio

J.B. Swenker, H.Roeters, N.R.Kiel-Klunder
retadreso: nrkielklunder@hotmail.com



Enhavo

- 3 Klubkunvenoj
- 4 Naskiĝtagoj
- 5 Kotizo
- 5 Pri la nordo
- 11 KEI
- 11 Tago de la Groningena Historio
- 12 Kasisto
- 12 Eventoj
- 14 Forpaso
- 14 Verloren van Themaatprijs
- 15 Kapriol'!

Contributie Esperanto Noord-Nederland 2009

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 12,50
Gezinslid	€ 6,25
Donateur (minimaal)	€ 7,00
Abonnement LA VERDA STELO	€ 7,00
Over te maken op Postbanknr. 3822472 t.n.v. ESPERANTO NOORD-NEDERLAND te Bedum	

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van **ESPERANTO NEDERLAND**.

Vandaar dat wij hier ook het rekeningnummer ervan vermelden:
78 68 44 167 (TRIODOS-Bank), t.n.v. Esperanto Nederland, Middenweg
587, 1704 BH Heerhugowaard.

Lidmaatschap (incl. abonnement Fen-X)	€ 27,50
Gezinslid	€ 8,00

Klubkunvenoj

Novembro

26 Norberto Dias, pri Kubo

Decembro

10 19.00 festvespero (ĉiu kunportos manĝaĵon)

Januaro

7 vivanta gazeto

21 pri Ĉinio (Ineke)

Februaro

4 gramatiko (Wil)

18 jarkunveno

Marto

4 ŝatokupo (ĉiu)

18 stratnomo (ĉiu pri la propra strato)

Aprilo

15 Beatrix Potter

29 ankoraŭ ne konata

Majo

13 ankoraŭ ne konata

27 kune manĝi

- ŝanĝoj rezervitaj -

la plej freŝajn novaĵojn kaj
ŝanĝojn vi trovos en nia retejo
sub la rubriko

Aktuale

<http://pingveno.nl/klubo>

Laatste nieuws
26 november
gasten uit Cuba

Septembro

- 3 W. Akkerman
- 7 M.F.W. Kruijswijk
- 17 H.W.T. van Hogen- Cornelissen
- 24 A.E. Van der Heij-Alblas
- 30 A.H. Thomas-Nitzsche

Oktobro

- 2 R.M. Koopmans
- 3 D. van der Heijden
- 15 Ch.I. Behr-Kunst
- 29 A.M.H. Dodebier
- 30 P. van der Vlis

Decembro

- 1 R. Hofman
- 15 H. Molthoop
- 21 H. Leeuwerke-Kiers
- 30 R.J. Hettinga
- 31 A. Van der Heij

Januaro

- 4 W. van Ganswijk-Vlasblom
- 13 G. Lanooy-Nijlunsing
- 27 Ineke Emmelkamp
- 30 A.W. van der Veen

Februaro

- 11 H. van Kappen
- 17 A.A. Bellekom
- 18 S. Kok-Czeswinska
- 22 C. Boer-Pierie
- 28 L.H. Staghouwer

Marto

- 24 E.J. Begeman

Aprilo

- 1 T. Bulk-Beenen
- 6 P. Kappen-v.d. Kamp
- 7 A. v.d. Meer
- 17 M.K. Heide



Naskiĝtagoj



Kotizo 2009

Bedaŭrinde estas kelkaj membroj, kiuj ankoraŭ ne pagis la kotizon por ĉi tiu jaro, kvankam ili ricevis retmesaĝon aŭ leteron kun la peto pagi la kotizon kiel eble plej baldaŭ.

Mi opinias (esperas), ke ili ne intence prokrastis la pagon, sed tamen la forrestado de la pago ja ĝenas min. La koncernaj membroj estas urĝe petataj ne pli longe prokrasti la pagon. Kaj ege plaĉos al mi, se ili samtempe pagos ankaŭ la kotizon por la jaro 2010.

La kasisto



Contributie 2009

Ondanks gezonden herinneringen (per mail of brief) zijn er nog een paar leden die hun contributie voor dit jaar nog niet hebben betaald. Ik neem aan, dat dat niet opzettelijk is, maar vervelend vind ik het wel. De betreffende leden wordt dan ook dringend verzocht de contributie voor dit jaar en bij voorkeur gelijktijdig ook die voor 2010 zo spoedig mogelijk te voldoen.

Het zou heel prettig zijn wanneer de juiste leden zich hierdoor voelen aangesproken en dat op het volgende bankafschrift van de vereniging hun betaling staat vermeld. De penningmeester

Pri la Nordo

16 aprilo 2009

Ĉu vi scias, ke 2009 estas jubilea jaro de Esperanto, ke ĝi estas zamenhofa jaro? Nu, mi ne sciis sed aŭdis tion, kiam Wil voĉlegis leteron de Ans Heijstra. Fakte Ans plendis, ke la propagando pri la zamenhofa jaro estas tiel malvasta. Kaj, ĉar mi ne sciis pri tio, ŝi do pravas.

Antaŭ iom da tempo ni ricevis inviton de lernejo el Leeuwarden por tie prezenti Esperanton. Dirk Rietdijk iris al la lernejo. La invitinto mem ne ĉeestis, kaj la ĉeestantoj tute ne interesiĝis pri Esperanto, bedaŭrinde. Ni esperas, ke Douwe Beerda havos pli da sukceso, kiam li iros al lernejo en Limburgo. Sed, mi supozas ke jes, ĉar tie la lernantoj invitis esperantiston. Ili volas lerni Esperanton.

Ni demandis Wiebren pri la programo de la 30-a de majo. Li eksplikis, ke ĉiuj estas bonvenaj, ankaŭ eksterlandaj gastoj. Laŭ la programo ni rondvojaĝos kaj vidos interalie Sloten, Lemmer, Balk kaj Bolsward. Fariĝos ĝuinda tago.



La programo de la vespero estis: aŭskultu kaj respondu.


Wil kunportis instruilojn de Katalin Kováts. La taskoj estis ege malfacilaj. Testo 24 estis pri mesaĝoregistrilo. Laŭ la testo Matilda aĉetis tian aparaton kaj

per ĝi, alveninte hejmen, ŝi notas siajn farendaĵojn en notlibron.

Ni devis helpi ŝin, sed ŝiaj konatoj ege malhelpis.

Ili ekzemple ne klare indikis la nomon aŭ la celon. Ili simple komencis paroli. Nur per la solvo, malantaŭe en la instru-libro, ni povis kompreni, kiuj telefonis al Matilda, kial ili telefonis, kaj kion Matilda devas fari.

Wil kunportis ankaŭ libron de Reto Rossetti: Liza kaj Paŭlo.



Laŭ la kovrilo ĝi estas "Sondramo por stimuli la studadon de Esperanto". Ĉi tiu libro ja estis komprenebla, ankaŭ al homoj kiuj ne flue parolas kaj komprenas Esperanton.

7 majo 2009

La 7-an de majo okazis la lasta kunveno antaŭ la somera libertempo.

Gastpreleganto estis Federico Faccio Peldez, kiu naskiĝis en Argentino. Li loĝis tie tri jarojn. Tiam li transloĝiĝis al Hispanio. Poste li denove loĝis dum tri jaroj en Argentino, sed ĉar li estis tiom da jaroj en Hispanio, kie li vizitis lernejon kaj studis, li sentas sin hispana. En ambaŭ landoj oni parolas la hispanan lingvon.



Mapo de Hispanio kun lokoj de diversaj lingvoj markitaj per koloroj:

- nur hispana lingvo
- kataluna lingvo
- eŭska lingvo
- galega lingvo
- asturia lingvo
- aragona lingvo
- aranvala lingvo

Estas iom da diferenco inter la du hispanaj lingvoj, sed ne tre multe. En Hispanio estas parolataj tri lingvoj, kiuj tute ne egalas. La eŭska lingvo estas la plej antikva lingvo, eĉ el ĉiuj eŭropaj lingvoj.

Frederico vigle rakontis pri Hispanio, pri la regiono, kie li loĝas, la registaro de Hispanio, pri la ŝanĝoj en ĝi en 1975 post la morto de generalo Franco, la tre milda transiro de diktaturo al demokratio post la atenco en Madrido en 2004. Hispanio estas tre granda lando, do la distancoj inter urboj estas grandaj. Federico miris, ke en nia malgranda lando li tamen

bezonis 3 horojn por la trajnvojaĝo de Roterdamo al Groningeno.

En Roterdamo li volontulas ĉe UEA por TEJO, la Tutmonda Esperanto Junulara Organizo. Li tie okupas sin ĉefe pri administrado. Fakte li estas tradukisto. Li scipovas la hispanan, la anglan, la francan lingvojn kaj de nelonge ankaŭ la nederlandan lingvon. Por lerni la nederlandan li studis dum 3 monatoj nian lingvon en Gent. Afiŝo ĉe UEA logis lin al Roterdamo.

Kiam nederlandanoj rimarkas, ke li estas eksterlandano, ili komencas paroli al li en la angla. Lia reago tiam estas: "Spreek je geen Nederlands?" (ĉu vi ne parolas la nederlandan?) Antaŭ ol komenci la laboron en Roterdamo, li laboris dum monato en du restoracioj. Trovi tian laboron ne donis problemon.

Aliaj temoj, pri kiuj li parolis, estas la diferencoj inter Hispanio kaj Nederlando rilate la sanasekuron, la veteron, religion, la trafikon. 'Fietspaden' (biciklovojetoj) ne estas konataj en Hispanio.



Eŭropa trafiksigno markanta biciklovojojn

Ankaŭ la vorto 'koopavond' estis stranga por li. En Hispanio oni laboras de la naŭa matene ĝis la dua posttagmeze, tiam oni paŭzas du aŭ tri horojn, dum kiuj oni manĝas la ĉefmanĝon kun multe da viando. Poste oni laboras denove de la 5-a ĝis la 8-a.

Li rimarkis, ke spontanee viziti iun aŭ ion ne estas kutimo ĉe ni, en Hispanio jes. Oni ankaŭ ne povas organizi ĉi tie ion tre rapide, ekzemple kurson. La nederland-

anoj frue planas aferojn kaj bezonas tempon por decidi.

La interesiĝo pri Esperanto estas en Hispanio pli granda ol en Nederlando. Tie povas okazi, ke 80 homoj anoncas sin por Esperanto-kurso. Ĉi tie oni ĝojas eĉ pri du. Tamen ne estas multaj Esperanto-kluboĵ, verŝajne pro la fakto, ke la esperantistoj loĝas dise en tiu granda lando. La kono pri lingvoj ĝenerale ne estas granda en



Hispanio, ankaŭ ne la kono pri la angla lingvo, kiun ili prononcas hispane.

Nia prezidanto kore dankis la preleginton kvaronon post la naŭa. Tiam Luit transportis lin per sia aŭto al la stacidomo. Ni daŭrigis la kunvenon per la legado de la protokolo de la antaŭa kunveno. Tiny Bulk ricevis orkideon pro sia go-a naskiĝdatreveno, kaj ni aŭdis ke el Leeuwarden venis senkulpigo pro la invito prelegi pri Esperanto por lernantoj, kiuj tute ne interesiĝas pri tiu temo.

Ni foriris kvaronon antaŭ la deka.

30 majo 2009 rondvojaĝo en Gaasterlando.



La suno brilis kiam ni alvenis en Harich.
Ni trinkis kafon kaj manĝis frisan kukon.



Post la kafo ni eniris en la aŭtojn por veturi tra Gaasterlando.
Ni promenis tra Sloten, bela urbeto.

Post la promeno ni daŭrigis la rondvojaĝon. Ni haltis ĉe restoracio apud akvo kaj plaĝo por lunĉi. Ni vizitis la ruĝan klifon apud Warns. Estis la loko de la batalo inter la frisaj kaj la holandaj homoj. Harlingen estis nia lasta urbo.



Ni reiris al la domo de Wiebren por manĝi kradrostaĵon. Ni kore dankas Wiebren, kiu organizis la tutan tagon.

Somerrenkontiĝo

Dum la somero ni kunvenis en la "Schimmelpenninkhuys" kaj en la ĝardeno de Nelly.

17 septembro 2009

La prezidanto Johan Swenker malfermis la kunvenon kaj bonvenigis Gerrit Berveling, la prezidanton de Esperanto Nederland. Wil rakontis, ke nia membro Greetje van Reenen mortis la 11-an de septembro. Ke ŝi ripozu en paco.

Johan rakontis ion pri nia klubo al Gerrit. Pri niaj budoj, pri niaj kontaktoj kun grupoj el Nord-Germanio kaj pri nia bulteno La Verda Stelo.

Gerrit prezentis sin. Li rakontis, ke li aŭdis pri la manko de estraranoj en la landa asocio. Li sentis sin respondeca kaj proponis sian helpon. Li elektiĝis prezidanto. Nun li vizitos la diversajn Esperanto-klubojn por ekkoni la vizaĝojn de la membroj.

Gerrit rakontis multe pri sia vivo ekde la naskiĝo. Kion? Iru al via propra loka grupo, kaj vi aŭdos pri lia vivo. Vivo interesa, vivo plenplena de plej diversaj aktivaĵoj. Li eklernis en 1972 Esperanton per la

televida kurso de Teleac: Kees van Kooten kaj Wim de Bie!

En 1979 li ekverkis en Esperanto. Nun li legas multe, mem verkas kaj tradukas diversspecajn librojn. Li estas docento pri klasikaj lingvoj kaj pastoro en remonstranta preĝejo.



Certe estas, ke Esperanto Nederland havas interesan kaj entuziasman prezidanton.

1 oktobro 2009 – Malferma vespero

En la "Gezinsbode" estis sciigo pri ĉi tiu malferma vespero.

Bedaŭrinde neniu "eksterulo" aperis.

Ineke raportas pri arta manifestacio en la Zamenhof-strato en Amsterdamo. Tie, kie estis ŝipkonstruejo, nun havas sian sidejon proksimume 200 malgrandaj entreprenoj kaj artistoj. Ankaŭ Esperanto Nederland havis tie budon dum la pasinta malferma semajnfino.

Gonda demandas, ĉu unu el ni partoprenos la venontan UK-on en Kubo. Neniu el la ĉeestantoj tien iros.

Ineke revas pri partopreno de la Azia Kongreso venontan jaron en Ulan Bator, la ĉefurbo de Mongolio. Ŝi esperas, ke estos kelkaj aliaj esperantistoj al kiuj plaĉas kune veturi tien per la Trans-Siberio-Ekspreso.

Wil kaj Johan ricevis mesaĝon de Anne, de la Esperanto-klubo Unterweser. La 5-an de junio 2010 la klubo festos sian 15-jaran ekziston. Oni esperas festi tiun ĝojigan fakton kune kun membroj de la bremena kaj la groningena kluboj.

Wil ricevis novaĵleteron de NEJ (Nederlanda Esperanto-Junularo). NEJ denove aktivis.

Gonda sciigas, ke unu el la lernantoj de Wil mendis E-vortaron de Middelkoop ĉe Bol.com. Ĉu tiu vortaro ankoraŭ estas havebla? Ineke respondas, ke Bol.com presas ekzempleron de tiu vortaro, se iu persono mendas ĝin (presi je peto).

Wil kunportis plurajn foliojn kun du plimalpli similaj bildoj. Tamen estas pluraj diferencoj inter ambaŭ bildoj. Alterne ni klarigas unu el la diferencoj.

15 oktobro 2009

La temo de la vespero estis ŝatokupoj. Venis gasto, kiu loĝas en la konstruaĵo, en kiu ni kunvenas. Ŝi sciis, ke unu el ni parolos pri akordionoj kaj kvankam ŝi ne estas esperantistino, do ne povis kompreni nian paroladon, ŝi tre volonte volus resti ĉe ni.

Unue ni preparolis kelkajn sciindaĵojn el Esperantujo. Venis invito el Germanio por kulturtago en Hameln, sabato la 24-a de oktobro.

Okazos studosemajnfino en Vlaardingen inter la 6-a kaj 8-a de novembro, en kiu Nelly partoprenos.

Johan gvidos 'broescursus', groninga vorto por rapidkurso, en la tago de la historio, la 17-a de oktobro. Tiun tagon oni povas aŭdi interalie ion pri kolonelo Thomson, la unua nederlandano, kiu mortis dum pacmisio en Albanio. Ineke legis, ke li estis esperantisto. La prelegantino, kun kiu ŝi kontaktis, tion ne sciis. Wil kaj Ineke raportis pri la Faulhaber-konferencotago en Amsterdamo, la 10-a de oktobro 2009. Temo: 150 jaroj L.L. Zamenhof. Ĉeestis 28 personoj, kaj prelegis Hans Bakker, Silvain Lelarge, Gerrit Berveling, Rob Moerbeek, Wim Jansen, Marlijne Hemelaar, Johan Derks kaj Douwe Beerda. La prelegoj estis interesaj. Ineke restis ankaŭ dimanĉon kaj havis tiam tre agrablan tagon promenantante sesope tra Amsterdamo.



La hobbio de Gonda estas ludi akordionon. Okjaraĝa ŝi ricevis pianinstruon, sed ĉar ŝi pli ŝatis orgenon, la gepatroj interŝanĝis la pianon kontraŭ orgeno. Sed 11-jaraĝa, ŝi lernis ludi ankaŭ akordionon. Je la aĝo de 14 jaroj ŝi ricevis propran akordionon, MENGHINI kun klavaro kaj 96 butonoj. Post du jaroj aperis la dua akordiono BUCARI ARMANDO, kiu pezas 20 kilogramojn kaj havas 148 butonojn. Ĝi estis el la jaro 1986. Gonda rakontis pri la funkcio de la diversaj butonoj.


Antaŭ duonjaro ŝi aĉetis sian trian akordionon, sen klavaro, do butonakordionon. Nomo de ĝi estas Weltmeister.



Denove ŝi devas lerni ludi per nova sistemo. Ŝi ekzercas en la domo de sia patro, ĉar en ŝia apartamento tio ne eblas sen ĝeni la najbarojn. Laŭ ni estis agrable aŭdi ŝian muzikon.

Post tio nia gasto, mem posedantino de akordiono, foriris.

Ŝatokupoj de Nelly kaj de Wil estas manlertecoj.



Nelly instruis al ni faldi birdon kaj helpe de Wil ni ornamis ĉokoladbriketon, per kio ĝi ricevis tute alian aspekton. Alian vesperon ni daŭrigos la temon, ĉar kelkaj ankoraŭ ne havis la okazon rakonti pri siaj ŝatokupoj.

KEI

Ĉiun jaron la novaj studentoj en Groningeno povas konatiĝi kun la urbo dum 'KEI-semajno'. Fakte, en tiu semajno la novaj studentoj precipe festas. Ili do lernas, kie ili povas festi. Kelkaj lernas, kie ili povas aĉeti aferojn kaj kiajn aliajn aferojn ili povas fari dum la studado. Tio lasta precipe okazas merkredon dum la kultura festivalo de la KEI-semajno.

Nia klubo jam dum kelkaj jaroj ĉeestas la kulturalan festivalon por montri, ke Esperanto estas interesa afero. Ĉi-jare la festivalo okazis sur Vismarkt. Do ne nur studentoj vidis nian budon, sed ankaŭ ordinaraĵoj urbanoj. Ĉu multaj homoj vidis nin? Verŝajne jes. Ĉu multaj homoj anoncis sin kiel lernanto aŭ membro? Bedaŭrinde ne. Sed ankaŭ kono de la nomo Esperanto estas grava. Kaj por tio ni daŭre ĉeestos tiajn kunvenojn.

Tago de la Groningena Historio

Dum la somera renkontiĝo ĉe Nelly Kiel, la klubo ricevis sciigon, ke la 17-an de oktobro estos Tago de la Groningena Historio en la groningena arkivo. Por tiu kunveno oni serĉis esperantiston. Johan anoncis sin por kontakti la organizanton. Dum la Tago de la Groningena Historio okazis multaj aferoj. Interalie okazis prelego pri Leŭtenant-Kolonelo L.W.J.K Thomson, kaj filmprezento pri la Batalo ĉe Heiligerlee.

Pri Esperanto oni petis nin organizi rapidkurson.

Johan iris al la Tago de la Groningena Historio kiel instruisto. Kiel ofte li

kunportis sufiĉe multajn librojn kaj aliajn aferojn por montri aŭ disdoni. Nelly akompanis lin. Tiel ili estis duope por organizi la aferojn, kaj tio necesis. La sama salono estis uzata ankaŭ por la filmprezento pri la Batalo ĉe Heiligerlee.



Tiel, ĉiu loko, kiun ni elektis por meti niajn librojn, ŝajne jam estis fordonita por aferoj rilate al Heiligerlee.

Johan dufoje instruis. En la mateno ĉeestis Richard. Li estas estrarano de NEJ kaj loĝas en Groningeno. Ĉeestis ankaŭ Nicolaas. Johan kaj Nicolaas konas unu la alian pro la komputilkublo. Krome ĉeestis tri novuloj. Johan uzis rektan metodon por paroligi ĉiujn. Kaj tio sufiĉe sukcesis, precipe ankaŭ pro la ĉeesto de konatoj kaj spertaj esperantistoj. Tio tre helpas kiam la instruisto diris: mi estas Johan, kaj indikas al lernanto ripeti similan frazon. Esperantistoj scias, ke ili ne simple ripetu la saman frazon.

Kiam nederlandano prononcas Esperanto-frazojn, oni povas rimarki, ke tiu estas nederlandano. Kiam rusoj prononcas Esperanto-frazojn, oni tuj rimarkas ion strangan: anstataŭ **ne** ili prononcas **nje**. Kiam Nicolaas prononcis Esperanto-vortojn, mi aŭdis la saman. Li

lernas la rusan lingvon kaj tiel li al kutimiĝis al la palatado de la litero N. (palato = gehemelte)

En la posttagmezo Johan denove instruis al proksimume ok personoj. Nicolaas kaj Nelly denove ĉeestis, sinjorino Hiemstra ĉeestis kaj komence tri, fine eble eĉ ses aliaj personoj lernis ion pri la lingvo kaj iom de la lingvo.

Por ni la Tago de la Groningena Historio do fakte estis granda sukceso. Dum nia malferma vespero ni ne ofte havas tiom da gastoj.

Kotizo – abono 2010

Estas pluraj, fidelaj membroj kaj abonantoj, kiuj proksimume je la jarŝanĝo pagas la kotizon aŭ la abonon por la nova jaro. Mi opinias ke estas sekvinda kutimo. Mi esperas ke multaj el vi samopinias. Ĉu eble ĉiuj?

Mi vere ĝojos se la venontaj konteltiroj de la klubo pruvos, ke ankaŭ vi (denove) apartenas al tiu grupo de fidelaj membroj. La kasisto

Esperanto-eventoj


El la multaj Esperanto-eventoj, kiuj estis organizitaj ĉi-somere Wil van Ganswijk-Vlasblom partoprenis du. En Vroclavo okazis la ekumena kongreso kun 230 partoprenantoj. La kongreso okazis ĉefe en unu konstruaĵo, en kiu preskaŭ ĉiuj partoprenantoj gastloĝis, kaj kie ni komune manĝis.

Ni vizitis multajn diversspecajn preĝejojn, dise en la urbo kaj havis en ili preĝmenton aŭ diservon. Estis urba ekskurso

kaj tuttaga ekskurso al tri malgrandaj urboj. En Vroclav oni povis viziti belegan botanikan ĝardenon, grandan panoramon, grimpi en turon (parte per lifto) kaj partopreni en ŝipveturo vespere sur la rivero Odra.

Estis kelkaj prelegoj, interalie pri Bonhoeffer kaj Sankta Francisko de Asissi. Ni aŭskultis multe da muziko kaj dum la adiaŭa vespero estis diversaj agrablaj prezentaĵoj de la partoprenantoj. Tio, kio tre plaĉis al mi, estis la renkonto kun amikoj el diversaj landoj. Tia amikeco ekestas kaj kreskas kiam oni regule ĉeestas kongresojn. Venontjare okazos kristana kongreso inter la 2-a kaj la 9-a de aŭgusto en Beregdaróc, en la oriento de Hungario, en bela nova konstruaĵo kun naĝejo! "Ĉu ankaŭ vi ĉeestos?", oni demandis min. "Tre volonte, se eblos!" estis mia respondo.

En Bjalistoko ĉeestis 1860 esperantistoj el 62 landoj la UK-on. (Universala Kongreso). Ankaŭ tiu semajno tre plaĉis al mi.



La UK estis tre sukcesplena kongreso. Ĉar ne estis en tiu urbo konstruaĵo kun salono, en kiu povis esti tiom da homoj, oni starigis tre grandan tendon kun podio, scenejlumoj, tv-ekranoj kaj bona sonplilaŭtigiloj.

Ĉiuj prezentaĵoj de diversspecaj grupoj estis tre bone preparitaj!

Inter la kongrespartoprenantoj estis ankaŭ la nepo de d-ro Zamenhof kun lia filino. Ĉeestis kelkcentoj da junaj partoprenantoj, kiuj disradiis entuziasmon kaj amuzon.

Ankaŭ la urbo mem disradiis etoson pri Esperanto. Multaj Esperanto-flaĝetoj estis videblaj surstrate. En la centro troviĝas Esperanto-restoracio, kaj sur la urboplaco prezentis sin iun vesperon granda orkestro kun ĥoro. Ankaŭ en unu el la parkoj estis Esperanto-muzikprezentado kaj de nia ĉambro ni eĉ vidis foje artfajraĵon. Mi supozas, ke ankaŭ ĝi havis rilaton kun Esperanto.

Tian kongressemajnon oni mem kompilas el ĉiuj ebloj kiuj estas ofertataj: prelegoj, amuzaĵoj, ekskursoj k.t.p. Per padelrada ŝipo mi veturis sur la rivero Bug, pri kiu mi antaŭe neniam aŭdis. Estis pli da surprizoj. La sekvontjara UK okazos en Havano sur la insulo Kubo. Mi decidis jam nun ne iri tien, ĉar mi ne ŝatas tiajn longajn vojaĝojn.

Dek du partoprenantoj de la UK, inter ili mi, aliĝis por mallonga turisma postkongreso en la limregiono kun Belorusio, kie troviĝas protektata naturregiono. Estas unu el la plej malnovaj arbarregionoj en Eŭropo, do praarbaro.

En rezervejo ni vidis bestojn, kiuj vivas en tiu regiono: tarpanoj, uroj, alkoj, cervoj, aproj, lupoj, kaproj, linkoj, vulpoj, sovaĝaj

porkoj k.t.p. Ni faris 4 kilometrojn longan promenon, irante sur lignopecoj aŭ arbotrunkoj tra arbarparto, kie estas marĉo kaj kie ni estis atakataj de multaj kuloj, kontraŭ kiuj ni havis ŝmiraĵon, sed ĝi ne vere helpis. Ni biciklis 3 horojn sur bonaj arbarvojoj, sed ankaŭ estis vojetoj grandparte el sablo, sur kiuj bicikli fakte ne eblis.

Ĉe malnova fervojstacio, nun luksa restoracio, staris tablo sur la reloj, ĉirkaŭ kiu sidis manĝanta familio. Kvankam trajnoj tie ne plu pasas, mi tamen iom timis kiam mi vidis tiun situacion. Meze en la arbaro estas la landlimo. Troviĝis tie konstruaĵo en kiu laboras polaj kaj aliflanke rusaj limgardistoj. Oni tie ne rajtas fari fotojn!

Ni ĝuis plenaeran kradrostadon, sidis ĉirkaŭ kampfajro, veturis per tre simpla vagonaro inter la kreskaĵoj, kaj iun vesperon ni reiris al nia hotelo per tri de ĉevaloj tiritaj ĉaretoj.

Al nia grupo apartenis 5 nederlandanoj, francino, fino, svisa geedza paro, germano, japano kaj juna polo, mezlernejano ankoraŭ, kiu tre lerte kaj entuziasme interpretis inter la pola gvidistino kaj ni.

Mi uzis dum miaj ferioj, kiuj tre plaĉis al mi, aŭtobuson, trajnon kaj laste flugmaŝinon.

Wil van Ganswijk-Vlasblom.



Forpaso

La 11-an de septembro 2009 forpasis je la aĝo de 75 jaroj nia anino Greetje van Reenen.

Ŝi studis Esperanton ĉe mi. Ni iĝis amikinoj kaj renkontis unu la alian regule.



Kune ni foje ĉeestis Zamenhof-semajnfinojn en Elspeet, vizitis ekspoziciojn de Ton Schulten kaj Henk Helmantel en Ootmarsum kaj Westeremden. Ŝi tre ŝatis ankaŭ muzikon kaj teatraĵojn. Post ŝia transloĝiĝo de Zuurdijk al Hooghalen ŝia atento direktis sin speciale al la genepoj, kiuj loĝis tiam tre proksime. Mian naskiĝtagan feston en januaro ŝi ĉeestis kun aliaj Esperanto-geamikoj. Komence de julio mi lastfoje vizitis ŝin. Kiam venis la sciigo pri ŝia forpaso, mi estis tre kortuŝita. Bets Dodebier kaj mi ĉeestis la enterigon. Mi esperas, ke ŝi ripozu en paco.

Wil van Ganswijk-Vlasblom.

Contributie – abonnement 2010

Een groep trouwe leden en abonnees heeft de goede gewoonte om zo rond de jaarwisseling de contributie of de abonnementskosten voor het nieuwe kalender jaar te betalen. Wat mij betreft is dat een gewoonte die navolging verdient. Ik hoop dat velen (het liefst allen) er net zo over denken. Het zou toch wel aardig zijn wanneer de volgende bankafschriften van de vereniging laten zien dat u het met mij eens bent.

De penningmeester

Verloren van Themaat-premio



Dum la jarkunveno de Esperanto Nederland Wil van Ganswijk-Vlasblom ricevis Verloren van Themaat-premion.

Unua kido de la muzikgrupo Kapriol'!

Ĉi tiu nederlanda muzikgrupo estiĝis spontanee dum balfolk-vesperoj. Antaŭe la membroj jam donis multajn festajn prezentadojn.

Marita kaj Marian longatempe ludis en la Esperanto-grupo Kajto kaj nun ili duope prezentiĝas kiel Marianta.

Ad kaj Rutger jam abunde meritis siajn spronojn ĉe siaj festbandoj Blue Tape Band kaj Kalis.

Kvarope ili formas la novan grupon Kapriol'! kaj prezentas svingan kaj varian programon per balfolk-dancmelodioj kaj kantoj en Esperanto, kiuj estas ĉiuj tradicie nederlandaj aŭ memfaritaj. Konkize dirite, ili ludas kaj malnovan muzikon per muzikiloj novaj kaj memfaritan muzikon per muzikiloj malnovaj.



Ĉion ili kombinas kun bela plurvoĉa kantado kaj plurkoloraj aranĝadoj. Krom tio improvizaĵo estas grava parto.

Balfolk signifas: balo kun tradiciaj dancoj, kiuj jam estas ŝatataj dum multaj

jarcentoj en tuta Okcident-Eŭropo. Temas pri pardancoj kiel skotiŝo, polko, valso kaj mazurko, vicedancoj kiel bureo aŭ andro. Estas ankaŭ rondodancoj kiel cerklo kaj ĵigo, ĉe kiuj la partneroj daŭre interŝanĝas. Ne necesas multe da dancekspliko, ĉar la bazo de la balfolk-dancoj estas sufiĉe simpla. Tamen la progresintaj dancantoj povas ĝisfunde ĝui la dancojn kun variacioj kaj subtilaĵoj.

Por koncertoj Kapriol'! havas vesperplenigan programon, sed malpli longe ankaŭ eblas. Laŭdezire la grupo povas:

- Doni koncerton por aŭskulti.
- Instrui la balfolkdancojn por dancigi la publikon.
- Igi la publikon kanti kanonojn el la kanonlibro de Kajto.
- Krom la Esperanto-repertuaron la grupo povas prezenti nederlandajn kantojn kaj dancmelodiojn.

La instrumentaro de Kapriol'! estas:

Ad Bos - kaĥono (drumkesto) kaj aliaj frapinstrumentoj, klavaro, kantado

Rutger Dijkstra - basgitaro, gitaro, violono, mandolino, kantado

Marita Kruijswijk - flutoj, ŝalmo, sakfluto, kantado

Marian Nesse - akordiono, kantado

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO – taal zonder grenzen